

<p>N. N. 32, Rozbranĉo forĝermadis</p>	<p>N. N. 32, Burĝonis rozar- bedo</p>	<p>N. N. 32, En rose så jeg sky- de</p>	<p>N. N. 32, A spotless roze is gro- wing</p>	<p>N. N. 32, Elkreskis roz- branĉeto</p>
<p><i>tradukita de Felix Ney</i></p>	<p><i>tradukita de Guido Holz</i></p>	<p><i>tradukita de Thomas Laub</i></p>	<p><i>tradukita de N. N. 33</i></p>	<p><i>tradukita de Joachim Gießner</i></p>
<p>Rozbranĉo forĝermadis el trunk' de nobelec'. Prauloj jam kantadis: de Jiŝaj ĝia spec'. Floreton portis ĝi, en akra vintro estis, Je horo de noktmez'.</p>	<p>1. Burĝonis roz-arbedo el delikata sin' laŭ olda kant-heredo, Jiŝaj la origin'; ekĝermis ĉarma flor' dum frosta vintro-tempo je noktomeza hor'.</p>	<p>En rose så jeg skyde op af den frosne jord, alt som os forðum spåde profetens trøsteord. Den rose spired frem midt i den kolde vinter om nat ved Bethlehem.</p>	<p>1. A Spotless Rose is growing, Sprung from a tender root, Of ancient seers' foreshowing, Of Jesse promised fruit; Its fairest bud unfolds to light Amid the cold, cold winter, And in the dark midnight.</p>	<p>1. Elkreskis rozbranĉeto el rozarbust' de Di'. Aŭguro de profeto rakontis jam pri ĝi. Naskiĝis rozfloreto' meze en vintra nokto laŭ diro de profet'.</p>
<p>La branĉo anoncita Jesaja de profet': Maria netuŝita, de kiu la floret'. Eterne volis Di': naskinta infaneton Plej pura restis ŝi.</p>	<p>2. El virgulin' beata, mirinda roz-arsed', elvenis flor' benata laŭ diro de profet'. Laŭ sankta Di-ordon' ŝi naskis infaneton por nia sav' kaj bon'.</p>	<p>For rosen nu jeg kvæder omkap med Himlens hær: en jomfru var hans moder, Maria ren og skær. I ham brød lyset frem midt i den mørke vinter om nat ved Bethlehem.</p>	<p>2. The Rose which I am singing, Whereof Isaiah said, Is from its sweet root springing In Mary, purest Maid; Through God's great love and might The Blessed Babe she bare us In a cold, cold winter's night.</p>	<p>2. Ja naskis tiu rozo - Jesaj' prognozis ĝin - el sia korpo sproson Mari' la virgulin'. Laŭ dipotenca vol' ŝi naskis Di-infanon por tuta mond' konsol'.</p>
<p>De tiu eta floro alvenas bonodor' Ĝi brilas en la koro, mallumon pelas for. Homido, Dia Vort', nin el sufero helpas, De pek' Savant' kaj mort'.</p>	<p>3. Kaj ĉi floreto belas, amindas per parfum'; la nokton ĝi forpelas per sia brila lum', nin helpas el mizer', el pek' kaj morto savas; Li, hom' kaj Di' en ver'.</p>	<p>Den rose fin og lille har dejlig duft og skær, den lyse for os ville og sprede mørket her. I sandhed mand og Gud, af syndens nød og pine han nådig hjalp os ud.</p>	<p>3. Kaj tiu belfloreto tre hele lumas ĝi. Obskuron la brileto forprenas nun de ni. Vi hom' kaj vera Di' el pekoj kaj suferoj estas savant' por ni.</p>	<p>3. Kaj tiu belfloreto tre hele lumas ĝi. Obskuron la brileto forprenas nun de ni. Vi hom' kaj vera Di' el pekoj kaj suferoj estas savant' por ni.</p>
<p>...</p>	<p>...</p>	<p>...</p>	<p>...</p>	<p>...</p>

Traduko de la Germana poemo “Es ist ein Ros entsprungen” de N. N. 32 en Esperanton de Felix Ney.

Arg-618-1246 (2012-10-18 22:27:59)

Tiu ĉi Esperantigo troviĝas en la retejo <http://www.reocities.com/cigneto/thctxt/r/rozbrancx1.html>.

Traduko de la Germana poemo “Es ist ein Ros entsprungen” de N. N. 32 en Esperanton de GUIDO HOLZ (*1920 – †1989).

Arg-618-1245 (2014-09-07 14:38:29)

Tiu ĉi kanto troviĝas en la eklezia Esperanta kantlibro “Adoru”, n-ro 223. Vidu ankaŭ la retejon <http://www.reocities.com/cigneto/thctxt/b/burgxonis1.html>. Pri Guido Holz vidu la retejon http://eo.wikipedia.org/wiki/Guido_Holz.

Traduko de la Germana poemo “Es ist ein Ros entsprungen” de N. N. 32 en la Danan de Thomas Laub.

Arg-618-1249 (2012-10-19 19:29:42)

Tiu ĉi danigo de la kanto troviĝas en <http://ingeb.org/spiritua/esistein.html>. Vidu ankaŭ: http://da.wikisource.org/wiki/En_rose_s%C3%A5_jeg_skyde_kaj http://www.ugle.dk/en_rose_saa_jeg_skyde.html. Pri Thomas Laub vidu la retejn http://de.wikipedia.org/wiki/Thomas_Laub.

Traduko de la Germana poemo “Es ist ein Ros entsprungen” de N. N. 32 en la Anglan de N. N. 33.

Arg-618-1248 (2012-10-19 08:19:20)

Tiu ĉi traduko troviĝas en <http://ingeb.org/spiritua/esistein.html>.

Traduko de la Germana poemo “Es ist ein Ros entsprungen” de N. N. 32 en Esperanton de JOACHIM GIESSNER (*1913-12-23 – †2003-11-25).

Arg-618-1244 (2012-10-18 21:24:22)

Tiu ĉi poem-traduko troviĝas en <http://www.esperanto.de/kantoj/index-giessner.html>. sub <http://www.esperanto.de/kantoj/kantoj.pdf>.